Universala Esperanto-Asocio

AKTIVULA MATURIGO

Estrara Subteamo: MOVADO

Ekstrakto el: Estrara Komuniko 2014-1 sendita el Budapeŝto , la 22an de januaro

Al: Landaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne), Fakaj Asocioj, la Komitato, Konsilianoj, ILEI, TEJO, listoj kaj unuopuloj

Seminario pri AMO 1

Tiu okazos de la 22a ĝis la 24a de marto, 2014 en Horány, sur insulo en Danubo ĉ. 40 km. de Budapeŝto. Ĝi okazos kun du komunaj tagoj kun Junulara Esperanto-Renkontiĝo (JER), renoma aranĝo de la Hungara Esperanto-Junularo (HEJ). Vidu informojn pri la ejo, atingeblo, kostoj kaj aliĝo ĉe www.jer.hu. Tuj tie aperos ankaŭ skiza programo. Gvidontoj estos Veronika Poór (Hungario), Lu Wunsch-Rolshoven (Germanio), Petro Balaž (Slovakio), Orlando Raola (Usono) kaj Stefan MacGill (Hungario).

UEA disponigas tri stipendiojn de po cent eŭroj por faciligi la partoprenon de potencialaj aŭ nunaj aktivuloj. Tio celas unuavice junajn loĝantojn de landoj apud Hungario, kun limigita pagipovo. La retejo konigos kiel interesatoj anoncu sin.
Ni turnos nin al la koncernaj Landaj kaj Fakaj Asocioj por ricevi rekomendojn kaj kandidatojn: ni imagas, ke tiuj aktivuloj poste plenumos funkciojn en tiuj Asocioj, aŭ en lokaj kluboj aŭ grupoj. Kaze de stipendipetoj el Hungario, la disponigita sumo estus malpli, sed eblus akcepti pli da homoj. Kaze de apudlandanoj, cent eŭroj devos sufiĉi por kovri loĝ-, program- kaj vojaĝ-kostojn.